

Heinrich Heine,  
Lorelay

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Min kaptas malgaj' en la koro,  
pro kio tia trist' ?  
Fabel' el antikva foro  
ne lasas de mi kun persist'.

Aere fridetas, trankvilas,  
malhelas jam la Rejn'.  
La monto surpinte brilas  
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,  
jen supre por ador';  
la ora ornamo ridas;  
ŝi kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora kombilo  
kaj kantas kun pasi';  
mirigas min la elbrilo  
kaj forto de l' melodi'.

...

Heinrich Heine,  
Lorelej'

*tradukita de Leopold Elb*

*Tiu traduko estas poste iom modifita  
de aliuloj, ne estas la origina traduk-  
versio de Leopold Elb.*

Ne scias mi, kial mi estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheliĝas,  
Fluadas la Rejn' en trankvil',  
La supro de l' monto lumiĝas  
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon kronas  
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuŝas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

...

Heinrich Heine,  
Lorelejo

*tradukita de Joachim Gießner*

Malgajon mi sentas en koro,  
sed kial tia tim' ?  
Legendo el pratempa foro  
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,  
kaj malvarmetas l' aer'.  
Sed brilas la mont' en orbelo  
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas  
per ora juvelar',  
kaj ŝia beleco allogas  
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,  
sirene kantas ŝi  
per neimagebla, mirige  
potenca melodi'.

...

Heinrich Heine,  
Lorelej

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamen-  
hof*

Ne scias mi, kial subita  
malgaj' en la koro naskiĝis;  
el tempo jam enterigita  
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,  
la Rejno mallaŭte babilas,  
per oro de l'sun' en vespero  
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:  
en ora ornamo brilante,  
sur supro de l' monto ŝi sidas,  
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas  
kaj kantas tra l' pura aero,  
kaj forto mirinda sin trovas  
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

...

Ŝipisto ŝipeton gvidas,  
lin kaptas ve' de ekzalt'.  
Li ja la rifojn ne vidas',  
li vidas nur supren sen halt'.

Mi kredas, ke ondoj tiras  
la ŝipon funden de l' Rejn';  
kaj tio de l' kant' eliras  
de Lorelaj-siren'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

*Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)*

Kaj sopiregon eksentas  
Ŝipisto dum sia vetur';  
Rifaron li ne priatentas,  
Al monto rigardas li nur.

Mi kredas, ke dronos finfine  
Ŝipisto kun sia boat',  
Kaj tion kaŭzis feine  
La Loreleja kantad'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

*Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)*

*La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.*

Ŝipiston en eta boato  
Turmentas koremoci'.  
Ne ĝenas lin rifo-kaskado,  
rigardas nur supren al ŝi!

Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo  
la ondoj lin kun boat'.  
Nun kuŝas li en la profundo  
pro Loreleja kantad'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-11-25).*

*Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)*

*Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kantokolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorffstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: [Josef.Schiffer@t-online.de](mailto:Josef.Schiffer@t-online.de)), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.*

Ŝipet' iras sur la rivero,  
ŝipisto ekstremis de l' kanto,  
kaj blinda por ĉiu danĝero  
rigardas li al la kantanto.

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela  
perdiĝis sub l' akvoturnado;  
ĝin Lorelej' faris kruela,  
per sia mirinda kantado.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)*

*Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*